



KONVERSACIA

LITERATURO

8


**LA LITERATURON SKRIBIS
LA PERSONOJ EN LA KONVERSACIO**



La Esperantista himno.

Movo de milita marŝo.

F. DE MÉNIL




1. En la mond-on ven - is nov - a
2. Sub la sankt - a sign - o de l'Es -
3. Sur neŭ - tral - a lingv - a fun - da -




sent - o, tra la mond - o ir - as fort - a vok - o; per flug -
per - o, ko - lekt - iĝ - as pac - aj ba - tal - ant - oj, kaj ra -
ment - o, kom - pre - nant - e u - nu la a - li - an la po -




il - oj de fa - cil - a vent - o nun de lok - o flug - u ĝi al
pid - e kresk - as la a - fer - o per la - bor - o de la Es - per
pol - oj far - os en kon - sent - o u - nu grand - an rond - ou fa - mi



lok - o. Ne al glav - o sang - on so - i fant - a ĝi la
ant - oj. Fort - e star - as mur - oj de mil - jar - oj in - ter
li - an. Ni - a di - li - gent - a ko - leg - ar - o en la



Fortigante
hom - an tir - as fa - mi - li - on; Al la mond' e - tern - e mi - lit -
la po - pol - oj di - vid - it - aj, Sed dis - salt - os la obs - tin - aj
bor - o pac - a ne lac - iĝ - os, Ĝis la bel - a song - o de l'Hom -



La trian fojon iru al signo
ant - a Ĝi pro - mes - as Sankt - an har - mo - ni - on.
bar - oj per la Sankt - a Am - o dis - bat - it - aj
ar - o por e -



ter - na ben' e - fek - tiv - iĝ - os.

Ĉiu rajto rezervita.

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Hago.



Bonan vesperon!

Gesinjoroj, mia nomo estas **Miki Muso**.

Bonvolu atenti: ne „muŝo”, sed „muso”. Inter la du vortoj estas granda diferenco. La muŝo estas malbela sespieda besto. Sed ni, musoj, estas inteligentaj bestoj, ĉar ni havas nur kvar piedojn.

Gesinjoroj, mi venis al vi, ĉar mi volas gratuli al vi.

Dum la konversacioj vi estis bonaj gelernantoj, ĉar vi atentis kaj vi respondis ĉiam forte, kuraĝe kaj elegante. Vi scias la gramatikon kaj viaj kapoj estas vorto-fabrikoj. Gesinjoroj, mi levas mian ĉapelon antaŭ vi.

Gesinjoroj, post la konversacioj ne forgesu vian belan novan lingvon, sed faru praktikon. Ĉiutage legu, skribu kaj parolu multe **Esperante!** Mi faros kontrolon: mi rigardos vin el sekretaj partoj de viaj ĉambroj. Ĝis la revido! **Ĝis la!**

En la lernejo.

Instruisto: Infanoj, atentu! **Nomadoj** estas tiuj popoloj, kiuj dum la tuta vivo iras de loko al loko. Ĉu vi komprenis?

Gelernantoj: Jes, ni komprenis!

Instruisto: Kiu povas diri ekzemplon?

La malgranda Adolfo: Mi!

Instruisto: Diru kuraĝe!

La malgranda Adolfo: Niaj servistinoj!



La aŭtoro de Esperanto,

D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof,

naskiĝis la 15-an de Decembro 1859 en la urbo Bjalistoko (Polujo). Lia patro, Marko Zamenhof, estis gimnazia instruisto de modernaj lingvoj kaj geografio. D-ro L. L. Zamenhof estis okul-kuracisto kaj vivis en Varŝavo, la ĉefurbo de Polujo.

La unua lernolibro de Esperanto aperis en la jaro 1887, en Varŝavo. En tiu tempo la nomo de la lingvo estis: **Lingvo internacia**. Sur la libro ne estis la nomo de D-ro Zamenhof, sed lia aŭtora nomo: **Doktoro Esperanto**. La vorto „Esperanto” signifas: tiu homo, kiu esperas.

D-ro Zamenhof mortis la 14-an de Aprilo 1917 en Varŝavo.


La lingvo Esperanto havas
28 literojn:


a, b, c, ĉ, d, e, f,
g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ,
k, l, m, n, o, p, r,
s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

La 5 pli dikaj literoj estas vokaloj, la 23 aliaj estas konsonantoj.

Grava regulo: En la Esperantaj vortoj la antaŭlasta vokalo estas pli forta.

Atentu: La litero ŭ ne estas vokalo.





La tri ursoj.

Popola fabelo.

Skribis fraŭlino E. F.

Estis foje tri ursoj, kiuj kune vivis en arbarego. La unua estis grandega ursego, la dua estis mezgranda urso kaj la tria estis eta ursido, kun ruĝaj okuletoj.

La tri ursoj estis feliĉegaj. Ili havis domon kun tri malegalaj ĉambroj. En la ĉambrego ili manĝis, en la ĉambro ili dormis kaj en la ĉambreto ili tenis la manĝaĵojn.

En la ĉambrego estis unu tablo kaj ĉirkaŭ la tablo unu seĝego, unu seĝo kaj unu seĝeto.

En la dormoĉambro estis unu litego, unu lito kaj unu liteto.

En unu mateno la ursino faris bonegan supon el lakto kaj mielo ¹⁾ kaj verŝis ĝin en tri malegalajn tasojn: en tasegon, tason kaj taseton. Sed la supo estis varmega kaj la ursoj ŝatas nur la varmetan supon. Tial la tri ursoj volis manĝi nur poste. Ili eliris kaj promenis en la arbarego.

Dum tiu tempo knabineto kun la nomo Orabuklo venis al la domo. Ŝi perdis la vojon, ŝi estis lacega kaj malsatega. Ŝi eniris en la domon, vidis la supon kaj diris:

— Bonega! Ĉi tie estas manĝaĵo, sed neniu manĝanto!

1) Mielo = dolĉa manĝaĵo. Malgrandaj flugantaj bestoj faras ĝin el la floroj.



Orabuklo manĝis el la tasoj kaj sidis sur la seĝojn. La seĝego estis altega. La seĝo estis tre alta. La seĝeto estis bona, sed ĝi estis malforta kaj krakis sub la knabineto.

Post la manĝo ŝi volis dormi. Ŝi provis la tri litojn. La litego estis malmolega kaj la mezgranda lito tre malmola. Sed la liteto de la ursido estis bonega kaj Orabuklo post kelkaj sekundoj dormis dolĉe.

Kiam la knabineto estis dormanta, la ursoj revenis. En la ĉambrego la ursego fortege diris: „Kiu sidis sur mia seĝego?” La ursino diris: „Kiu sidis sur mia seĝo?” Kaj la ursido diris: „kiu sidis sur mia seĝeto?”

Rigardu, rigardu, ĝi estas rompita!”


Post tio la ursego murmuregis: „Kiu manĝetis el mia supo?” La ursino murmuris: „Kiu manĝis el mia supo?” Kaj la ursido murmuretis: „Kiu manĝegis mian supon, la tutan, la tutan?”

Post tio la ursoj rapidis en la dormoĉambron. La ursego murmuregis: „Kiu kuŝis en mia litego?” La ursino murmuris: „Kiu kuŝis en mia lito?” La ursido murmuretis: „Kiu kuŝas en mia liteto? Rigardu, rigardu!”

En tiu momento Orabuklo vekiĝis, rapide saltis el la domo tra la fenestro kaj la tri ursoj neniam revidis la knabineton.

Kiom da vortoj havas Esperanto?

En la unua vortaro de Esperanto (**Universala Vortaro**) estas rondcifere 2600 vortoj. En la **ses aldonoj**, aperintaj ĝis la fino de la jaro 1935, estas entute 2000 vortoj rondcifere. Do Esperanto havas **4600 oficialajn vortojn**. Krom tiuj vortoj la aŭtoroj uzas aliajn, neoficialajn vortojn. Ili estas en la vortaroj. La 4600 vortoj estas nur radikoj. El ili ni faras multajn milojn da vortoj.



Korespondu!

La plej interesa kaj facila praktiko en Esperanto estas: **korespondi**. Vi povas havi bonajn amikojn en la tuta mondo kaj ricevi de ili interesajn leterojn, belajn bildojn kaj objektojn. En la Esperantaj gazetoj vi trovas multe da adresoj. Elektu el ili kaj skribu!

Ekzemplo de anonĉeto en la gazeto:

S-ro **Petro Nigra**, muzikisto, Malpur-strato 2., Verdurbo (Boto-kudlando) . — Dez. koresp. per L kaj PK pri muziko kaj vetero, nur kun eŭropanoj. Dez. interŝ. PM kaj PI, k.ĉ.l. Nepre kaj ĉiam tuj respondos.

Ŝlosilo de la mallongigoj:

s-ro = sinjoro	koresp. = korespondi	PI = poŝtkarto ilustrita
s-ino = sinjorino	interŝ. = interŝanĝi	PM = poŝtmarko
f-ino = fraŭlino	L = letero	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
dez. = deziras	PK = poŝtkarto	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

Modelo de la unua letero:

Amsterdamo, la 13-an de Aprilo 1935.

Estimata samideano!

Mi trovis vian adreson en la gazeto „La Praktiko“ kaj mi deziras interŝanĝi kun vi ilustritajn poŝtkartojn, ĉar via lando kaj ĝia popolo tre interesas min. Mi esperas, ke mi povos iam viziti vian landon. Mi estas juna fervojisto. Ĉi tiu bildo montras la centran stacidomon de mia urbo. Atendante vian afablan respondon mi salutas vin samideane:

Karlo Dika.

Mia adreso:

Bonvolu atenti!

- 1) Skribu ĉiam **tre klare**, precipe la adresojn.
- 2) Por via propra adreso uzu kaŭĉukan stampilon.
- 3) Se vi anoncis en gazeto, ke vi deziras korespondi, vi devas respondi al ĉiu persono al vi skribinta, **almenaŭ unufoje**.

LA PLEJ BONA LINGVO

Originala romaneto en tri partoj.

Skribis: Karl Löfgren, Gävle (Svedujo).

1.

Filemon Lundin estis la nomo de la plej malfeliĉa homo en la tuta mondo. Li amis. La nomo de la amata fraŭlino estis Malin Alknopp. Kaj, ankaŭ ŝi amis lin.

Sed kial estis Filemon malfeliĉa? Ĉar li ne sciis, ke Malin amas lin.

Filemon estis sana, fortà kaj ruĝa, sed li havis unu gravan eraron: li estis tre mal-kuraĝa. Malkuraĝega. Li ne parolis kun Malin.

La tempo iris. Iliaj okuloj parolis en la okula mond-lingvo, sed ili ne rigardis al la okuloj, sed al la tero.

Kiam Malin venis, la koro de Filemon batis, bategis kaj la ruĝa koloro venis kaj iris ĝis la pintoj de liaj oreloj. Filemon salutis ŝin kaj silentis dum unu, du, multaj minutoj.....

Ili iris en la parkon kaj promenis inter la florantaj arboj.

La kapo de Filemon laboris kaj post kelkaj minutoj li rompis unu ruĝan rozon kaj diris:

— Ka- ka- ra fraŭlino, ĉu ne, ĉi tiu rozo estas tre bela?

— Jes, ĝi estas tre bela, — respon-
dis Malin.

— S - s - sed ĝi ne estas pli bela,
ol... ol...

Malin fermis la okulojn kaj diris:





— ...ol, ol?

— ol... ol... la blanka rozo, — respondis Filemon.

Malin ploris en la koro. Filemon silentis.

En momento venis policisto kaj diris al Filemon:

— Sinjoro, mi vidis, ke vi rompis rozojn en la parko. La rozoj ne apartenas al vi. Nur malbonaj homoj rompas rozojn en la parko. Venu kun mi al la policejo.

Ili iris. Malin restis sola.

2.

Filemon sidis hejme sur la seĝo kaj parolis al la muroj: — Ĉu mi estas azeno? Jes! Kial? Ĉar mi estas malkuraĝa. Ĉu? Jes, jes! Absolute!

Li iris kaj sidis, sidis kaj iris. Li ne havis apetiton, li ne manĝis kaj ne trinkis, li ne dormis.

Li prenis la gazeton, malfermis ĝin kaj vidis la frazon: „LERNU ESPERANTON, ĉar ĝi estas la plej bona lingvo”.

Filemon diris al si: „En mia koro estas bildo kaj ĝi faras min malsana. Mi volas forgesi la bildon. Mi lernos Esperanton kaj mi ne havos tempon pensi pri la bildo”. Kaj li faris tiel. Li iris en la konversacion kaj li lernis rapide kaj bone. Kaj li ne rigardis la bildon en sia koro.

Sed.

En unu bela vespero li iris hejmen. Inter la promenantoj li vidis fraŭlinon Malin. Lia koro tre batis. Si salutis lin kaj demandis:



— Ĉu vi volas promeni kun mi? La vespero estas tre nigra kaj mi estas malkuraĝa fraŭlino.

Filemon prenis ŝian manon kaj ili iris. Filemon silentis. Malin faris egale. Ili iris sur longaj stratoj kaj ili venis al ŝia hejmo. Ili staris antaŭ la pordo. Filemon estis malfeliĉa. Sed en momento venis lumo en lian kapon. Li pensis: „Malin ne komprenas Esperante. Mi diros al ŝi mian sekreton en la Esperanta lingvo”. Kaj li diris kuraĝe:

— Mia kara, mi amas vin! Tre! Tre! Ĉu ankaŭ vi amas min?

Sed nun Filemon devis fari tre grandajn okulojn. La piedoj ne portis lin, li falis sur la teron. Ĉu vi scias, kial? Jes, ĉar Malin respondis — en la Esperanta lingvo:



— Kara Filemon, la sekreto de la sukceso estas: parolu forte, kuraĝe kaj elegante!

Filemon levis sin kaj diris:

— Ĉu... ĉu... ĉu vi komprenas Esperante?

— Jes, ĉar mi iras al la konversacioj de pastro Ĉe. Kaj kiu estas via instruisto?

— Sinjoro redaktoro Morariu el Rumanujo ¹⁾.

Malin metis sian molan maneton en la manon de Filemon kaj diris:

— Vi faris al mi demandon kaj mi respondas al vi:

¹⁾ En la jaro 1929 sinjoroj Andreo Ĉe kaj Tiberio Morariu faris Esperantajn konversaciojn samtempe en la sveda urbo Gävle.

Jes, mi amas vin. En la Esperanta lingvo kaj en la sveda lingvo. En ĉiu lingvo de la mondo.

Kaj ili kisis unu la alian.

Filemon ne silentis nun. Li diris belajn, dolĉajn vortojn.

3.

Hieraŭ mi vidis Filemonon kaj Malinon. Ili promenis en la parko kaj inter ili iris du malgrandaj infanoj. Unu knabo kaj unu knabino. La knabo diris al Filemon:

— Patro, kio estas Esperanto?

— Kara fileto, ĝi estas la plej bona lingvo de la mondo.

— Kial?

— Hodiaŭ mi ne povas diri al vi tion, ĉar vi estas tre malgranda. Sed post kelkaj jaroj mi diros al vi belan veran romanon kaj vi komprenos, ke Esperanto estas la plej bona lingvo de la tuta mondo.



*Se vi volas rapide progresi en Esperanto,
vi devas legi la plej interesan gazeton:*

LA PRAKTIKO

Riĉa enhavo de facilaj kaj interesaj tekstoj kun bildoj kaj gravaj gramatikaj lecionoj. — Konkursoj kun multaj premioj. Aperas monate.

Abono por unu jaro: nur 2.50 guld.

Petu senpagan specimenon!

**Adreso: Redakcio de LA PRAKTIKO, Riouwstraat 172,
Den Haag (Nederlando).**

NIK NEK KAJ KAT JEN

(Malgranda romano)

Oka kaj lasta parto.

Alvenis la gravego tago, en kiu Nik Nek edziĝas kaj Kat Jen edziniĝas.

La materialistoj povas diri ĉion, kion ili volas, sed tamen la plej dolĉa, la plej bela estas en la mondo tiu momento, kiam du sentoriĉaj koroj, amantaj unu la alian, unuiĝas kaj forgesas pri tio, kion la morgaŭa tago alportos. Ili banas sian animon en la printempa varmo de la amo kaj vidas la tutan mondon en roza koloro. La iluzioj beligas la vivon. Sinjoro Mate



Matik havas tiajn pensojn, kiam li staras malantaŭ la juna paro. Kortuŝite li aŭskultas la vortojn de la sinjoro oficisto, kiu parolas belajn frazojn al la junaj geedzoj. La maljuna Mate Matik iam tre deziris aŭdi tiajn frazojn. Lia rigardo longe ripozas sur ŝiaj haroj. Ili estas blankaj, kiel la freŝa neĝo. Antaŭ multaj jaroj ili estis noktanigraj..... Sed ŝiaj okuloj restis bluaj, marobluaj kaj hodiaŭ montras la saman purecon, kiel antaŭ 30 jaroj. Jes, la saman purecon, sed kun laca brilo, kun larma lumo. En ŝiaj okuloj nun ridetas la aŭtuno.

— Tea, rigardu la printempon! — Mate Matik diras tre mallaŭte al ŝi. — Ĉu vi rememoras pri nia printempo?

— Mi ne volas rememori pri tio kaj nun silentu. Mate..... La vintro estas antaŭ nia pordo.

Sinjoro Mate Matik rigardas al la konatoj de sinjoro Nik Nek. Du sinjoroj kun verda stelo sur la vesto.

La atestantoj de la fianĉo. La geatestantoj de Kat Jen estas li kaj la onklino. Ĉe la pordo staras Bub Destrat en sia festa vesto kaj ankaŭ li sentas la gravecon de la momento. Li pensas pri tio, ke iam ankaŭ li staros antaŭ la grava sinjoro kaj ankaŭ li tenos blankan knabinan manon en sia mano. Sed kiam? Eble post multaj jaroj. Li estas ankoraŭ juna knabo.

La oficisto gratulas al la gesinjoroj kaj ĉiuj foriras al la preĝejo peti la dian benon kaj helpon por la geedza vivo.

... ..
La aŭtomobilo haltas antaŭ la preĝejo. La juna paro iras sur la ŝtupoj al la pordego, kie staras la gesinjoroj de la konversaciaj vesperoj. Ridetante ili salutas la junan paron. Ĉe la altaro haltas ili. Post momento venas la pastro kaj faras la ceremonion... kaj li parolas en esperanta lingvo. Li faras belan paroladon kaj post tio ekkantas la ĥoro supre en la ĥorejo. La kantoj laŭdas Dion kaj petas benon por la junaj geedzoj. La gesinjoroj iras al ili gratuli kaj doni florojn al Kat Jen, kiu estas la plej bela el ĉiuj floroj.



Post tio gesinjoroj Nek kun kelkaj gekonatoj vizitas restoracion, kies malgrandan saloneton beligas verdaj standardoj. Dum la festa tagmanĝo la gastoj deziras feliĉan vivon al la juna paro. La paroloj tuŝas la koron de sinjoro Nik kaj li respondas per dankplenaj vortoj.

La juna edzino sidas apud Mate Matik kaj diras al li:

— Karega sinjoro Matik, mia matematiko estis bona:
Nik Nek + Kat Jen = Kat Nek — kaj ŝi feliĉe ride-

tante rigardas al la okuloj de la bona amiko.

— Jes, mi vidas! Kaj mi deziras, ke via bone farita matematiko donu feliĉon al vi.

... ..

Sur la perono de la stacidomo la gesinjoroj levas blankajn poŝtukojn kaj diras „adiaŭ” al Nik Nek kaj al lia edzineto, kiuj staras ĉe fenestro de la foriranta vagonaro. Ili aŭdas ankoraŭ la kantatan himnon de la Esperantistoj:



*„En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko.....”*

— Bela paro, — diras sinjoro Mate Matik al sinjorino Tea Kuler. — Tutkore mi deziras al ili, ke la malriĉeco ne rompu tiun harmonion, kiun ili havas nun en la koroj.

— La malriĉeco ne rompos ĝin, — diras sinjorino Tea Kuler kaj ŝi ridetas. — Sinjoro Nek edziĝis kun unu el la plej riĉaj knabinoj de la urbo.

Mate Matik longe rigardas al ŝi. Li ne komprenis.

— Jes, jes! Mi diris la puran veron. Li edziĝis kun riĉa knabino, sed li ne scias tion. Ankaŭ Kat ne scias, ke ŝi havas multan monon.

— Sed ankaŭ mi ne scias. De kiu ŝi ricevis monon?

— De mi, kara Mate... Mi devas diri al vi sekreton. Nun mi povas diri tion, ĉar ni tre maljuniĝis. Antaŭ kvin jaroj Filp Kuler mortis en Ameriko kaj li faris testamenton pri siaj farmo kaj arbaro. Per bona laboro li regajnis al si tion, kion li perdis kaj elspezis dum sia juna aĝo. Antaŭ sia morto li rememoris pri mi

kaj pri siaj eraroj.

— Sed mi ne sciis pri tio. Vi ne diris al mi tiun gravan aferon.

— Ne, ĉar ni estis jam tro maljunaj por komenci novan vivon. Kaj mi ne volis fari paŝon, kiu en nia aĝo ne estas tute saĝa. Ĉu vi komprenas, kara Mate?

Jes, mi komprenas... mi tre bone komprenas kaj mi pensas, ke vi bone faris kaj... kaj nun Kat ricevos de vi iom da helpo... Ĉu?



Sinjorino Tea Kuler bonkore ridetis, jesis per la kapo.

— Post duonjaro ŝi ricevos dekmil dolarojn per la banko de tiu urbo, kie ili loĝos tiam... kaj post mia morto...

— Ne parolu pri morto... vi estas ankoraŭ forta, sana kaj...

— Ne diru malveran komplimenton. Post via kaj ne venas la **juna**, sed la **maljuna**. Sed mia maljuneco ne estas malbela. Mi vidas, ke mia nevino estas feliĉa. Mi estas tre danka al Dio, ke Li helpis min kaj nun mi povas redoni al la filino de mia frato tion, kion mia edzo forprenis de ili.



... ..
Nik kaj Kat sidas en la intima silento de kupeo de la kuranta vagonaro. Iliaj lipoj ridetas, la okulparoj ame brilas. Ilia animo festas kaj kantas. Nik prenas sian taglibron el la poŝo, serĉas en ĝi la malnovan poemeton „Al fraŭlino K. J.“ kaj unuafoje li montras ĝin al ŝi.

— Rigardu, mia amata, ĉi tiun mal-

KUL

Esperanto

485 1

grandan versaĵon...

— Ĉi vi volas far...

— Jes, jes! Nur le...

Kat legas kaj fel...


kaj ankaŭ ŝi volas... la regulojn de la etiketo.

— Nik, mia amata, vi estas poeto... Kion mi donu al mia poeto?... Ĉu miaj lipoj plaĉas al vi?

La respondo de Nik estas muta, sed la plej dolĉa en la tuta mondo.

Tra la fenestro la varmaj radioj de la printempa suno karesas ilin.

F i n o



La plej bela sporto estas:
vojaĝi,

ĉar la vojaĝo donas multan
plezuron kaj multan
instruon.



La esperantistoj estas feliĉaj, ĉar ili povas vojaĝi facile kaj agrable: en ĉiu parto de la mondo ili trovas bonajn geamikojn.

Karaj gesamideanoj, vojaĝu multe per fervojo, ŝipo kaj flugmaŝino!

